

Konciza historio de nia gimnazio

Rerigardante al la pli ol centkvardek jaroj ekde la fondo de la Gimnazio Berzsényi Dániel, estus menciindaj multaj okazaĵoj. Estas konsiderinde longa tiu tempodaŭro, ĝi traarkas gravajn eventojn de la landa historio ekde la germanlingvigaj streboj post la subpremo de la kontraŭhabsburga naciliberiga milito en 1848/49, tra la intelekto renoviga periodo de la jarcentŝanĝo, tra revolucioj kaj mondmilitoj ĝis la nunaj tagoj.

Ĉi-kadre ne estas eble priskribi kompletan historion de la lernejo, ni centrigu do la gravajn eventojn ĉirkaŭ sep datojn, kiam okazis signifaj ŝanĝoj en la vivo de la lernejo.

1858

La laŭjura antaŭulo de la Gimnazio estis fondita la 4-an de oktobro 1858 laŭ la spirito de germanigaj streboj kiel la unua ŝtata gimnazio de Pest, kun la nomo *K.K. Gymnasium in Pesth*. Ĝia unua konstruaĵo estis parto de la – tiam ankoraŭ ruinigita – Redoute, urba amuzejo, hodiaŭa koncertejo *Vigadó*. La instruado estis organizita laŭ la studplano Entwurf¹, t.e. en okjara instruperiodo kaj kun abiturienta ekzameno ĉe la fino.

1861

Komence la lingvo de la instruado estis la germana. Ĉirkaŭ 1860 jam estis sentebla mildiĝo ĉikampe, tial nome de la hungaraj anoj de la intruistaro kvar pedagogoj prezentis memorandon al la gubernia instanco favore je la uzo de la hungara lingvo.

La memorando kaj komentario pri ĝi aperis en la ĵurnalo *Pesti Napló* la 1-an de januaro 1861. (La propagandilo de la instruistoj favorantaj la germanlingvan instruadon estis la gazeto *Pester Lloyd*: ilia kontraŭa deklaro estis tie publikigita la 16-an de januaro 1861.)

Rezulto: laŭ la komunikado nro 852. de la gubernio datita la 2-an de februaro 1861. ekde la dua semestro la lingvo de la instruado en ĉiuj ok klasoj iĝis la hungara.

1876

Estas grava jaro en la vivo de la gimnazio, ja en tiu jaro ĝi memstariĝis loke. La konstruaĵo de la strato Markó, nro 29. ĉe la angulo de la tiama strato Súlyom estis realigita laŭ la planoj de Kolbenheyer je nivelo kiun eĉ eksterlandaj gastoj admiris. La kapelo kaj festsalono estis ornamitaj per pentraĵoj, skulptaĵoj. (Tri freskojn de la festsalono pentris LOTZ Károly, tri aliajn THAN Mór.)

1920

Denove grava dato: laŭ ministeria dekreto (nro 110.492/V. de VKM el la jaro 1920.) ĉiu mezlernejo devis elekti patronon indikendan en sia oficiala nomo. Tiel iĝis ekde la lernojaro 1920/21. la nomo de la gimnazio: Berzsényi Dániel Ĉefgimnazio de la V-a distrikto.

1941

Dum la lernojaro 1941/42. la du gimnazioj de la strato Markó, la Gimnazio Berzsényi kaj la Realgimnazio Bolyai estis kunfanditaj laŭ la dekreto de la ministerio datita la 8-an de julio 1941 sub la nomo Berzsényi Dániel Gimnázium, sed en la konstruaĵo de la Gimnazio Bolyai (nroj 18-21 de la strato Markó).

1952

Post la lernojaro 1951/52. la Gimnazio Berzsényi estis translokita, kvazaŭ puncele, al la XIII-a distrikto. (Ĝi devis postlasi kaj la konstruaĵon, ekipaĵon, la valoran bibliotekon kaj laboratoriajn materialojn.) La tiama instrupolitiko havis eĉ du celojn atingendajn per tiu ĉi dispono: alĝustigi al la postuloj de la kvindekaj jaroj la etoson de la lernejo kiu ĝis tiam peris burĝajn valorojn kaj kulturon, kaj samtempe ekfunkciigi altnivelan mezlernejon ankoraŭ mankantan en la fabrikmedia XIII-a distrikto.

1986

Post longa tempo la gimnazio instaliĝis – la duan fojon dum ĝia ekzisto – en propra konstruaĵo. La novkonstruita lernejo en la strato Kárpát, nroj 49-53. estas historie malpli riĉa, sed fine la gimnazio funkcias sen kuninstanco, en vasta loko kaj komforte.

*La tradicioj kaj atingoj
de la gimnazio*

La poeto Rónai Mihály András, iama lernanto de la Gimnazio Berzsényi menciis pri sia lernejo okaze de ties centjariĝo, ke ĝi estis „la plej malnova kaj plej bona ŝtata mezlernejo en Budapeŝto”. Vere estis karakterize, ke inter la instruistoj ĉiam multnombri elstaraj sciencistoj kaj artistoj kiuj sukcese disvastigis progresajn sociajn kaj sciencajn ideojn inter la junularo ĉiam malferma je novaj pensoj (ekz. Ady Lajos, Benedek Marcell, Borzsák István, Czerven Flóris, Kempf József, Luttor Ignác, Marót Károly, Rómer Flóris, Vajthó László kaj aliaj.)

Tiel, multaj el la lernantoj de la Gimnazio same iĝis elstaruloj de la scienco, arto, publika vivo, ili plurfoje eĉ superis la profesorojn. (Jen kelkaj ekzemploj: Alexander Bernát, Bálint György, Carelli Gábor, Gellért Endre, Károlyi Mihály, Tom Lantos, Soros György, Réz Pál, Szepesi György, Chrudinák Alajos, Vas István, Hegedüs Géza, Sárközi György, Heltai Jenő, Herskó János, Klein György, Tétényi Pál, Szabad György, Koncz Zsuzsa ktp.)

La pretendo pri la altnivela, sukcesa laboro estas daŭre unu el la plej respektitaj tradicioj de nia gimnazio. Ekde pluraj jardekoj la Gimnazio Berzsényi estas avanulo koncerne la rezultojn de internaciaj kaj naciaj konkursoj, altlernejaj kaj universitataj enirekzamenoj kaj ŝtataj lingvoekzamenoj.

La bonaj rezultoj estas daŭre dankeblaj al bonaj geinstruistoj. Ĝis la fino de la 80-aj jaroj pluraj ricevis la distingojn „*Pro elstara laboro*” kaj „*Elstara pedagogo*”, ekde 1990 du ricevis la *distingon Apáczai Csere János*, unu la *Meritmedalon pro laboro* kaj unu estis distingita distriktnivele. Pro la elstara instrua-eduka laboro la instruistaro de la Gimnazio ricevis la ĉefurban ordenon *Pro Urbe*.

Nia gimnazio havas abundajn internaciajn rilatojn: el Transilvanio kun Jimbor (h. Székelyzsombor) kaj Brasov (h. Brassó); el Italio kun Romo, Florenco, Mantuo, Venecio, Puglia kaj kun Sicilio; el Germanio kun Düren kaj kun Nordrejna-Vestfalia; el Francio kun Elzaco. Ĉiujare okazas klasinterŝanĝoj, internaciaj renkontiĝoj de gekolegoj.

Kial la lernantoj estas volonte anoj de tiu gimnazio?

Ĉar troviĝas en ĝi sana, serena, sincera etoso, la instruistaro kaj lernantaro kunlabore ligiĝas, la interrilatoj estas senperaj, kulturitaj kaj bazitaj je la estimo de la alia homo.

Tiun agrablan etoson de la Gimnazio Berzsényi kaj la senton de fideleco al ĝi pruvas ankaŭ tiu fakto, ke inter la geinstruistoj multnombri iamaj lernantoj kaj tio, ke en la vivo de la lernejo tra multaj jaroj ĉeestas ankaŭ la Amika Rondo de Iamaj Lernantoj.

Dum la lastaj jardekoj iĝis tradiciaj la printempaj Tagoj de Lernejo, la ekskursoj kaj tendaroj por interkonatigi la novulojn fine de aŭgusto kaj la festo okaze de la fondiga datreveno de la gimnazio.

trad. km